



Subtenu la Esperanto-
Kulturon!

PILO-PRESS

***** Eldonanto/Herausgeber:

Internacia
Informservo

Pariaĝo membro
de Internacia
RONDO

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

N-ro 19/1975 22 majo 1975

"Amikoj de E - literaturo kaj kulturo"

Aperas ĉiusemajne

Kongreso harmonia kaj laŭprograma

Oberkirch (pp) Laŭprograme kaj en plena harmonio pasis la 53a Germana Esperanto-Kongreso pentekoste en Oberkirch, kiun ĉeestis ĉ. 150 kongresanoj kaj gastoj el kelkaj aliaj landoj. La moderna urba halego montriĝis taŭga kongresejo, kie ankaŭ havis lokon la tre interesa Esperanto-ekspozicio pri la temo "Esperanto kaj Turismo", aranĝita de Esperanto-grupo Oberkirch, kaj la ampleksa libro-ekspozicio de Libroservo Pickel, Nürnberg.

En ĉeesto de televido, radio kaj gazetaro F. W. Poppeck, la prezidanto de la LKK, malfermis la Esperanto-ekspozicion, kiu trovis intereson ĉe la kongresanoj.

Por la kongresa inaŭguro, sabate je la 17a de majo, s-ro Heiss, vicprezidanto de GEA kaj LKK-ano, povis saluti ankaŭ kelkajn membrojn de la honora kongresa komitato, la urbestron de la urbo Oberkirch, Erwin Braun, kaj la iman prezidanton de la Eŭropa Parlamento, prof. d-ro Hans Furler. Ambaŭ gastoj direktis al la kongresanoj vortojn de bonvolo kaj simpatio.

El la eksterlandaj gastoj, kiujn alparolis la kongreson, ni mencias: F-ino Claude Nourmont, ĝenerala sekretariino de Unuiĝo Franca por Esperanto, S-ro Mudrak, Vieno, por AEF, S-ino Kalina Pienkiwicz, Varsovio, por la Pola Esperanto-Teatro.

La inaŭguran paroladon faris d-ro Werner Bormann, prezidanto de GEA, pri la "Esperanto-Turismo". Li parolis pri la kvanto kaj kvalito de la kutima turismo kaj elstarigis la Esperanto-turismon sen komunikadaj problemoj. Ankaŭ li montris la organizojn por la akcelado de la Esperanto-turismo kaj la kontribuojn de ŝtatoj, urboj kaj de komercaj firmaoj al la Esperanto-turismo. Fine li skizis la perspektivojn de la Esperanto-turismo.

Pri la jarĉefkunveno de GEA ni raportos en la venonta numero de Pilo-Press. Ĝenerale oni povas diri, ke ĝi pasis en trankvilo kaj sen surprizoj. Elstaras la anonco de d-ro Bormann, ke la estraro de GEA estonte eldonos bultenon sub la nomo "Esperanto en FRG", kiu aperos 4foje jare kaj kiun ricevos la membroj krom la Eŭropa Esperanto-Revuo. Kadre de la jarĉefkunveno la prezidanto de GEA transdonis la "Honoran Insignon" de GEA al jenaj meritplenaj membroj: F.W. Poppeck, Oberkirch; Alfred Schmidt, Rüsselsheim; Bruno Vogelmann, Crailsheim.

Kulmino de la kultura vespero sendube estis la teatra prezentado fare de la Pola Esperanto-Teatro kun la komedio "Proksima Nekonato". La geaktoroj Kalina Pienkiwicz kaj Zbigniew Dobrzynsky rikoltis multe da aplaŭdo. D-ro W. Perrenoud, Svislando, denove sukcesis kateni la intereson de la geaŭskultantoj per sia kultura parolado pri "Turismo kaj kulturo". Sed ankaŭ la paroladoj okaze de la 10jara ĝemeliĝa jubileo inter la Esperanto-grupoj Gray kaj Oberkirch kaj certe ankaŭ la folklora muziko multe plaĉis!

El la sabata balo kun multe da laŭta muziko elstaras la riĉe dotita tombolo. Kaj la balo ne povis malhelpi, ke la dimanĉmatenan diservon en Esperanto ĉeestis multe da kongresanoj!

Ĉiuj aliaj aranĝoj, speciale la laborkunsidoj, pasis laŭprograme, kun pli aŭ malpli da partoprenantoj.

Unuanime la kongreso akceptis rezolucion al la kulturministerioj kaj parlamentoj de la federaciaj landoj kaj de la federacia registaro, kies germanlingva teksto aperas kiel aldone al la germanlingva informservo =Esperanto-Nachrichtendienst=.

Konklude oni povas diri, ke la kongreso bone sukcesis, ke ĉiuj estis kontentaj. La esprimita danko kaj rekonno al la LKK, speciale al s-roj Poppeck kaj Heiss, venis de el la koro. Ĉu La LKK estos kontenta ankaŭ el financa vidpunkto, montras la finkalkulo. 50 kongresanoj pli ĉiukaze estus farintaj la kongreson plena sukcese ankaŭ el financa vidpunkto.

Dankon meritas ankaŭ la loka gazeto, kiu dediĉis al la kongreso kompletan paĝon.

Kiel ni eksciis hazarde en Nürnberg, la televida elsendo prikongresa okazis marde, la 20 majo, en la kadro de regiona programo de Stuttgart.

IFEF-kongreso en Villach

Villach (pp) 700 kongresanoj kunigis la 27a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio en Villach, Austrio.

Dum la inaŭguro en la granda salono de la Kongresa Domo salutis reprezentantoj de 20 landoj, inter ili Japanio kaj Kameruno.

La gazetaro tre amplekse raportis pri la kongreso. En unu gazeto eĉ aperis por la kongresanoj informoj en Esperanto sub la titolo "Esperanto-servo" (Vidu la apudan eltranĉaĵon!).

La kongreso akceptis rezolucion, kies Esperantan tekston ni ĉi-sekve publikigas:

Esperanto servo

Kaiserangst ne plu okupite

La kontraŭoj de kongreso de elektra centro per samaj postoj, post 4-semajna okupado decidis forlasi la terenojn. Tiu decido okazis sub kondico, ke sia plukonstrado estu prokrastata ĝis okazigo de konferenco inter federacia registaro kaj okupitoj.

La konstruadoj, komencitaj la 14an de marto, ne estas evititaj, postulo ke ili tamen ne estu tiom koncentritaj en la trilanda angulo de Basel.

Sekuraj laborlokoj

La generalaj konstruadoj de la akto-posedantoj de la granda firmao Obo-Geigy, Saurer kaj Von Roll devos plifortigi la varbadojn por siaj produktaj rezervoj marmoredoj, akiritaj dum la jaro de plukonstrado estu nun utiligitaj por verigi certajn produktojn senprofito. Tiel evitigos maldungigoj kaj partiboro ĝis sinvenau fine de 1975. Ekzemplonon estas decidito, ne perforti la laboristojn per verifikoj de potenco pri la laborlokoj. Ho ne harmonias kun modernaj gvidprincipoj, kaj entreprenfilozofio, aplikitaj dum la lastaj jaroj.

El la kongresejo

La solenan inaŭguron, kiu okazis dimanĉo antaŭtagmeze en la Kongresstado Villach, cesis multaj honoraj gastoj de la ligandito Karintio, inter ili la du viclandestroj Erwin Frühbauer (ekministaro por tra-

fiko) kaj Herbert Bachler, la urbestro de Villach, ing. Josef Resch, kaj la prezidanto de la fervoja direkto Villach, hert.konm. d.öling, Franz Bachler. Ili subskribis la taskecon de sia internacia lingvo. La urbestro invitis la kongres-partoprenantojn al la akcepto kun regalo flanko de la urba komunumo. La kongreson saluis reprezentantoj el 20 nacioj. La nombro de la gastoj estis 675.

La posttagmeza ekkurso al monto Dobratsch, kiu ankoraŭ estas kovrita kun neĝo, havis bonan sukceson. Same bonan impreson faris la vespertaj prezentadoj de folkloraj dancoj kaj kantoj.

Kongresa Diservo

La kongresa Diservo okazis en Nikolao-preĝejo dimanĉo, la 11-an de majo 1975 je la 8-a horo. Kuneobris en Esperanto fransuzana pastro Albino Ciccani el Rimini (Italio) kaj kanoniko Karl Hochgatterer el St. Florian (Austrio). Partoprenis kaj aktive kunfatis preĝejonome 400 kongresanoj (de la Romo dispoziciitaj, de la LKK multnombritaj Esperanto-tekstoj). Esperanto la estas aliaŭsa kiel liturgia lingvo.

Pastro Ciccani en sia Esperanto-prediko kruon pritraktis de la evangelio. He ĉiuj estu unu! ankaŭ tute la tempo de samtempe fojstataj dimanĉo per la interkomunikite, en kiu ŝtato Esperanto havu signifan roton: interia, transparentaj, unuaj en praktiko.

Lau skumena konsidero evangelia kongresanto (frano Steglinde Stamm) laŭtigis la 1-an legolon de la „Agoj de la apostoloj“.

Kongresa Rezolucio

La 27-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazinta en Villach (Aŭstrio) kun 675 partoprenantoj el 20 landoj,

-konstatas, ke spite al nekontestablaj komplikajoj ĝenerale kaj daŭre estas aplikataj en internaciaj konferencoj la ĝisnunaj konservativaj metodoj de lingva interkompreniĝo pri buŝa interpretado resp. traduko de ŝribita materialo,

-atentigas, ke ankaŭ la fervojistaj kompanioj, fervojistaj sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj de fervojistoj aplikas samajn metodojn, pro kio perdiĝas sennombraj laborhoroj kaj konsiderinde plialtiĝas la kostoj,

- akcentas, ke la uzado de nur malmultaj "laborlingvoj" krome signifas lingvan subpremado de tiuj, kiuj ne regas tiajn lingvojn kiel gepatran lingvon, kio samtempe signifas plej fortajn malutilojn por la reprezentataj kompanioj aŭ organizaĵoj,
- opinias, ke fervojaj kompanioj, sindikatoj kaj organizaĵoj devus havi grandan intereson plej rapide forigi tiajn lingvajn nejustaĵojn kaj pro tio
- rekomendas, helpe de taŭga, longtempe praktike elprovita neŭtrala lingvo krei sur internacia nivelo la kondiĉojn por rektaj, samrajtaj, senkomplikaĵ lingvaj kontaktoj,
- proponas por tiu celo la internacian lingvon Esperanto, kiu plenumas ĉiujn kondiĉojn,
- deklaras, ke la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio pretas kunlabori por atingi tiun celon.

Esperanto en radio

aŭskulti

Pro la kongreso en Oberkirch mi ne povis ĉi-semajne regule/al ĉiuj elsendoj, kiel mi kutime faras. Sed mi konstatis ke en Oberkirch la aŭskultebleco ĝenerale estas bona. Tiel mi povis aŭdi el Varsovio la Esperanto-Ekspreson, en kiu oni raportis pri la inaŭguro de la 53a Germana Esperanto-Kongreso kaj la prezento de la Pola Esperanto-Teatro. En la ĉi-semajna rubriko "Pri la vivo de PEA" oni povis ekscii, ke nun aperis nova numero de Pola Esperantisto kun la dato septembro - oktobro 1974.

Radio Roma suferas pro nekontentiga aŭdebleco, kvankam lasttempe ĝi pliboniĝis. Pri tiu temo skribis Sakari Kauppinen, Velaatta, Finnlando: "La plej granda problemo de via stacio (t.e. Radio Roma!) certe estas la nekontentiga aŭdebleco. Mi mem estas sperta kurtonda aŭskultanto, kaj mi havas je mia dispono du bonegajn ricevilojn. Tamen mi havas malfacilaĵojn kapti la italan radion, tiel ke mi povu ĉion kompreni. Viaj elsendiloj certe estas malnovaj kaj ne tro fortaj, sed feliĉe via signalo ofte estas kontentige forta. Tio ne estas la ĉefa ĉagreno, sed interferado kun aliaj stacioj. Kial la itala radio ĉiam uzas la samajn malnovajn interferitajn frekvencojn? Notu jenan ekzemplon: mi povas preskaŭ ĉiutage aŭdi Radion Saharan de Hispana Saharo. Ĝi havas 10-kilovatan elsendilon kaj uzas frekvencon 11805 kilohercoj. La sola kaŭzo al ĝia bona aŭdebleco estas, ke en la sama frekvenco ne estas aliaj stacioj samtempe aŭdeblaj en Finnlando. Kvankam la radiaj bendoj nuntempe estas troŝarĝitaj, eblas trovi konvenajn frekvencojn, se oni ne volas fiksiĝi je siaj kutimaj frekvencoj."

Komento de la Esperanto-Redakcio de Radio Romo: "Ni dankas nian aŭskultanton pro la menciitaj konsiloj; ni mem povas nenion fari en ĉi tiu afero, sed ni tradukis nacilingven lian leteron, kaj ĝin submetos al la atento de la teknikistoj kaj de la estroj: ni vidos la rezultojn!"

Radio Vieno. El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas: "Dank' al Dio, pasinta estas la inflacio de jubileo - pri la militfino, pri restarigo de aŭstria respubliko kaj de politikaj partioj, kaj pri la Ŝtat-Kontrakto. Rilate al la laste menciita, la opozicio riproĉis, ke la registaro preparis ĝin fuŝe. Sed la meritoj de ĝuste tiu Ŝtatkontrakto ne bezonas jubilean primemorigon. Ili ankoraŭ evidentas antaŭ la okuloj de ĉiu aŭstriano."

Prezentadoj de POIA ESPERANTO-TEATRO EN FRG

Nürnberg (pp) Post la tre sukcesa prezentado de la teatraĵo Proksima Nekonato kadre de la kultura vespero dum la 53a Germana Esperanto - Kongreso en Oberkirch, la Pola Esperanto-Teatro prezentos la komedion en:

Nürnberg, Meistersingerhalle, Konferenzraum IV
dimanĉe, la 25.5.1975, je la 15a horo

München, Holzkirchner Bahnhof, Ausstellungsraum, Enirejo
Bayerstr., lunde, la 26.5.1975, je la 19a horo

Augsburg, Steppach (loko proksime al Augsburg), Brauerei Fuchs,
Alte Reichsstr. 10, vendrede, la 30.5.1975, je la 19a horo.

Esperantistoj, loĝantaj en aŭ ĉirkaŭ la koncernaj urboj, estas kore invititaj!

PROKSIMA NEKONATO estas komedio pri problemoj inter geedzoj de la pola aŭtoro Aleksander Scibor-Rylski en la Esperanto-traduko de Jerzy Grum. Ludas: Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynsky, Varsovio.

Prezentado en Stuttgart

okazos sabate, je la 7a de junio 1975, 17a horo en gastejo
"Flurwirt" Bad Cannstadt, Flurstr. 9 (apuda ĉambro).

Ankaŭ al la prezentado en Stuttgart la esperantistoj de tiu urbo kaj ĉirkaŭaĵo estas kore invititaj!

Oni volonte ankoraŭ akceptas invitojn por prezentadoj inter la tempo de la 1a ĝis la 5a de junio. Post la 7a de junio la geaktoroj verŝajne estos en Paderborn. La turneo de la Pola Esperanto-Teatro tra FRG, kiun organizas la Internacia Rondo "Amikoj de la Esperanto-Literaturo kaj Kulturo", finiĝos la 15an de junio.

Invitojn akceptas kaj informojn donas: Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Tel. 46 36 49.

Mortis Alfred Schmidt, Rüsselsheim

Alfred Schmidt, iama distriktestro de Groß-Gerau, mortis dum la 53a Germana Esperanto-Kongreso pro koratako. Dimanĉe, la 18.5. kadre de la jarĉefkunveno de GEA d-ro Werner Bormann transdonis al Alfred Schmidt la "Honoran Insignon de GEA" pro liaj meritoj pri Esperanto. En la nokto de dimanĉo al lundo li suferis koratakon kaj estis transportita al malsanulejo, kie li mortis. La 1an de majo li povis festi sian 70an naskiĝtagon. Al la edzino, kiu ankaŭ ĉeestis la kongreson, ni esprimas nian sinceran kunsenton.